Jukka Pietiläinen:

La kvara periodo en esperanta literaturo[1]

Pri la periodigo de esperanta literaturo

La tradicia periodigo de esperanta literaturo difinas tri periodojn: la unua ĝis la unua mondmilito, la dua inter la du mondmilitoj kaj la tria post dua mondmilito. La periodigo baziĝas sur ekster esperantujaj okazaĵoj kvankam verdire la militoj havis signifon ankaŭ al la esperanta movado kaj literaturo. La unua mondmilito klare finis la unuan periodon de la esperanta literaturo, sed al tio influis ne nur la milito mem sed la malapero de kvar elstaraj verkistoj: forpasis Zamenhof (en 1917), forpasis Grabowski (en 1921), kabeis Kabe (en 1911), malmultigis sian verkadon Devjatnin kies kolektitaj verkoj aperis jam inter 1906 kaj 1911 (Kralj 1960, 21; *Enciklopedio de Esperanto* 1933, 108).

La dua mondmilito havis malpli abruptan efikon, plejparte pro tio ke la ŝanĝoj komenciĝis jam pli frue, dum la periodo de ekesto de totalismaj reĝimoj en landoj kie Esperanto estis plej disvastiĝinta, kaj daŭris en la postmilita periodo en orienta Eŭropo. Tamen, eblas paroli pri diferencoj inter la literaturo de 1920-aj kaj 1930-aj jaroj kaj la literaturo de 1950-aj kaj 1960-aj jaroj. Fakte kaj kvante kaj kvalite ne temis nur pri progreso sed ankaŭ regreso de esperanta literaturo. En 1950-aj jaroj kaj komence de 1960-aj jaroj aperis malpli da libroj en Esperanto po unu jaro ol en 1920-aj kaj komence de 1930-aj jaroj. Nur en 1963 la nombro de libroj po unu jaro kreskis super 150 (*Esperanto* 6/1987, 110-111).

Laŭ Carlevaro la triparta divido estas nescienca, sed ĝi estas komforta kun kelkaj problemoj. Unue kvankam la divido estas facile konstatebla en poezio (liriko originala), ĝi estas "nur tre duba koncerne la prozon (ĉefe la novelon), kaj neekzistanta koncerne la romanon kaj la dramon" kaj due, "ankaŭ koncerne la lirikon, la periodoj ne dividiĝas klare" (Carlevaro en *Esperanto en perspektivo* 1974, 117). Krome, en la unua periodo plej gravis la tradukoj dum la originalaj tekstoj "restis pli da arkivaĵoj por la historio de literaturo, ol la arta legaĵo" (Kralj 1960, 35).

Post la unua mondmilito "energie kaj bunte ekfloris arte tre valora kaj lingve tre elstara poezio" (Kralj 1960, 39). Tamen la intermilita periodo estis ankaŭ periodo por la unuaj arte valoraj romanoj.

Post la dua mondmilito la verkado de multaj aŭtoroj de la dua periodo daŭris, sed la eksteraj kondiĉoj estis malsimilaj. La persekutoj kontraŭ Esperanto, kiuj havis sian efikon ankaŭ al literaturo, komenciĝis jam en 1930-aj jaroj unuavice en Germanio kaj poste en landoj sub ĝia regado kaj en Sovetio. Post la milito la malvarma milito kaj la dividiĝo de Eŭropo al du landogrupoj grave influis al Esperanto-kulturo. *Literatura Mondo* reaperis en 1947, sed malaperis, definitive, jam en 1949. Aperis novaj literaturaj revuoj, *la nica literatura revuo* kaj *Norda Prismo*. Nur en la 1960-aj jaroj la malstreĉiĝo en la internaciaj rilatoj kaj la florado de ŝtate subtenataj Esperanto-asocioj en pluraj landoj de meza, orienta Eŭropo iom ŝanĝis la situacion. Apud la negativaj rezultoj aperis ankaŭ pozitivaj ecoj, ekzemple, la Esperanto-literaturo fariĝis pli tutmonda ol neniam antaŭ dum aperis gravaj verkistoj en Japanio, Ĉinio, Sud-Afriko, Brazilo kaj aliaj landoj de Suda Ameriko. Tamen la tria periodo estis multsence daŭrigo de la dua, ekzemple Auld (1979) traktas la prozon ekde 1930 ĝis 1977 kune kaj konstatas ke ekzemple la skota skolo en *Kvaropo* sekvis la modelon de la *Parnasa gvidlibro*.

[1] Tiu ĉi eseo gajnis unuan premion en Belartaj Konkursoj de UEA en 2003. Publikigita en *Fonto* n-ro 277 (Januaro 2004), pp. 9-19. Tiu ĉi versio enhavas kelkajn lingvajn korektojn faritajn dum somero 2006.

Fakte, sekvante la periodigon de Auld eblus paroli nur pri du periodoj antaŭ la 1970-aj jaroj: la unua ĝis la 1930 kaj la dua post ĝi. Tiam la divida punkto estus la influo de la Budapeŝta skolo (la skolo de *Literatura Mondo*) kaj la apero de *Parnasa gvidlibro* (en 1932).

La komenciĝo de la kvara periodo

La evoluo de la esperanta literaturo dum la du-tri lastaj jardekoj kvante superis la ĉiujn antaŭajn kaj ankaŭ kvalite aperis novaj ecoj kiuj ebligas paroli pri la tute nova periodo en la esperanta literaturo. Unuafoje la nova epoko ne naskiĝis pro la signifa okazaĵo ekster Esperantujo, sed pro la evoluo ene de literaturo.

Se oni analoge al du antaŭaj periodŝanĝoj akceptus la eksteresperantujan kialon por la periodigado oni devus certe komenci la kvaran periodon el la jaro 1989, kiam kolapsis la orient-eŭropa socia sistemo kun profundaj sekvoj ankaŭ al esperanta movado kaj kulturo, inkluzive literaturo. La ŝtate subvenciataj Esperanto-asocioj perdis sian oficialan subtenatan pozicion, sed esperantistoj gajnis ideologian kaj vojaĝadan liberecon. Tio kune kun la ekonomia kolapso havis sekvojn kiuj signifis i.a. la falon de membronombroj ĉe oficialaj Esperanto-asocioj.

Tamen ĝuste en literaturo ne eblas trovi same grandan ŝanĝon de epoko: la eldonado daŭris kaj la problemojn ĉe la tradiciaj eldonejoj (i.a. Hungara Esperanto-Asocio) kompensis apero de novaj eldonejoj kaj en orienta (*Impeto, Sezonoj*) kaj en okcidenta Eŭropo (*Pro Esperanto*).

Se trarigardi la originalan beletron de Esperanto dum la pasintaj jardekoj eblas difini la komencon de la kvara periodo en la komence de la sepdekaj jaroj. En tiu periodo la plej okulfrpa estis la apero de novaj literaturaj revuoj kaj malapero de kelkaj malnovaj kaj la forta kresko en la kvanto de originalaj romanoj.

Pure kvante, en la formo de aperintaj libroj, la forta ŝanĝo okazis jam iom pli frue, en la jaro 1963, kiam la nombro de Esperanto-libroj kreskis de 131 ĝis 201 kaj depost tio la nombro nur momente dum la 1990-aj jaroj falis sub 170 (fakte temas pri komparo inter du statistikoj: unue, libroj eldonitaj laŭjare ĝis proksimume 1987, due libroj enmerkatigitaj laŭjare ekde 1987). Notindas ke, tiu nombro ne estis superita dum tridek jaroj inter 1933-1962. (La nombro de aperintaj libroj baziĝas sur la libroj posedataj de la biblioteko Hector Hodler kaj raportita i.a. en *Esperanto* 1987, 110-111).

Jorge Camacho proponas komenci la kvaran etapon ekde 1971 (apero de *Plena Ilustrita Vortaro*, kiu fakte okazis en 1970) aŭ 1973 petrola krizo (*Esperanto* 1156, februaro 2003, 39). Apero de *PIV* certe havis gravan signifon por la evoluo de la Esperanto-literaturo kaj tiel eventuale taŭgus por la komenco de la kvara periodo. Tamen, konante la funkciadon de la esperanta libromerkato la efiko de *PIV* ne povis esti tuja kaj krome la efiko de *PIV* al la lingvo kaj literaturo estis ja grava sed neniel signifa. La petrola krizo kiel la komenca signo de la kvara periodo apenaŭ taŭgas, estas ja malfacile vidi kian efikon ĝi havis por la esperanta literaturo.

Ankaŭ la apero de *Literatura Foiro* en 1970 povus esti rigardata kiel komenca punkto de la kvara periodo, same kiel la fermo de *Norda Prismo* en 1975. Tamen la signifo de unuopaj literaturaj revuoj fariĝis malpli grava en la kvara periodo kaj pro tio malfacilas difini ĝian komencon nur surbaze de unuopa revuo.

Ankaŭ la krizo ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA atestas pri la ŝanĝiĝo de la epoko. “De 1969 ĝis 1975 oni neniam atribuis unuan premion de prozo” kaj “en 1973 kaj 1974 (...) la unua premio estis aljuĝita en neniu branĉo” (Johansson 2000, 203). Eble temis pri la krizo de juĝkomisiono, en kiu membris Gaston Waringhien, Roger Bernard kaj Emilija Lapenna, kio eventuale atestas pri la fino de la periodo komenciĝinta en la 1930-aj jaroj. Meze de la sepdekaj jaroj la ŝanĝiĝo de la juĝkomisiono kaj la nova generacio de partoprenantoj la premiado denove ekfloris. Krome, ekde 1976 la Belartaj Konkursoj koncernas sin nur pri originalaĵoj kaj krome ekde 1976 aperis novaj

branĉoj, unue Eseo kaj Fotografio, poste Porinfana literaturo kaj Kanto (Johansson 2000, 202).

Eble ne hazarde, la epokŝanĝo kongruas ankaŭ kun la epokŝanĝo en la estraro de UEA: Lapenna foriris kaj lin anstataŭis nova, alitipa estraro.

La kvaran periodon distingas aparte la forta pozicio de la romanoj. Dum inter 1907 kaj 1999 aperis entute proksimume 120 romanoj, el tiu kvanto pli ol duono aperis post 1975, proksimume duono post 1980. Tial indas difini la komencon de la kvara periodo per apero de originala romano, nome *Neologisme* de Lorjak en 1975.

Neologisme estas modesta libro, kun siaj 88 paĝoj apenaŭ atingas la proksimuman minimuman amplekson de je 100 paĝoj (baze de kio Osmo Buller difinis la kriterion por kompilado de la listo de originalaj romanoj, aperintan fine de libro *Pigre pasas la nokto* de István Nemere). Tamen ĝi komencis en 1975 la periodon dum kiu ĉiujare aperis minimume unu originala romano en Esperanto. Ĝi estas la unua romano dum 12 jaroj post 1963 kaj tia senromana periodo ne okazis pli frue en la historio de esperanta literaturo. Tamen ĝuste en la 1960-aj jaroj aperis pluraj gravaj novelkolektoj, kiuj iasence pretigis vojon por la posta inundo de romanoj (ankaŭ de la samaj aŭtoroj).

En 1976 aperis dua romano de Lorjak kaj ankaŭ romano de Johán Valano, *Ĉu vi kuiras ĉine?*, unu el la unuaj krimromanoj en Esperanto.

La rigardo al la nombro de esperantaj romanoj dum jardekoj klare montras la kreskantan rolon de la romano. Tamen la 1930-aj jaroj estis ankaŭ grava por la evoluo de esperantaj romanoj, ĉar nur en la 1980-aj jaroj la tiama rekordo estis superita.

Originalaj romanoj en Esperanto dum jardekoj (surbaze de kriterioj prezentitaj en listo aperinta fine de *Pigre pasas la nokto*)

1900-1909	2	1950-1959	4
1910-1919	5	1960-1969	3
1920-1929	11	1970-1979	11
1930-1939	20	1980-1989	42
1940-1949	4	1990-1999	25

La nombro de la aperintaj originalaj romanoj tamen aludas, ke la falo de orient-eŭropaj sociaj sistemoj ja havis negativan efikon al la esperanta literaturo, kvankam ĝi restis malpli drasta ol ekzemple ĉe membraroj. Se kalkuli la nove aperintajn librojn laŭ “Laste aperis” de revuo *Esperanto* eblas konkludi, ke en 1989 estis registritaj 215 libroj, en 1990 la nombro estis 183, sed en 1993 nur 136. Tamen jam en 1995 la nombro superis denove 200 kaj ne falis sub ĝi post tio.

Ankaŭ ĉe la romanoj la falo senteblis. Dum en la dua duono de la 1980-aj jaroj aperis 22 romanoj, 9 el ili ĉe orient-eŭropaj eldonejoj (fakte ĉe nur unu eldonejo HEA, du el tiuj naŭ kuneldonis la finna Mendoservo), dum la unua duono de la 1990-aj aperis nur 8 romanoj, el ili 2-3 ĉe orient-eŭropa eldonejo (enigma La Fenikso ne indikas sian originon, sed verŝajne temas pri Hungario). Kiel tiuj ciferoj indikas fakte ne temis nur pri la falo de orient-eŭropa eldonado de romanoj, sed ankaŭ pri la problemoj de ĉefaj okcidentaj eldonejoj de romanoj, nome de Flandra Esperanto-Ligo kaj Edistudio, kiuj aperigis en la 1990-aj multe malpli da romanoj ol dum la 1980-aj. La falon de HEA komencis ekde 1993 kompensi la ruslandaj Esperanto-eldonejoj kaj en okcidento aperis novaj eldonejoj kiel Pro Esperanto/Internacia Esperanto-Muzeo. Inter la literaturaj revuoj la kolapso de la orienteŭropaj sistemoj trafis

Hungaran Vivon kiu ĉesis aperi en 1991, tamen *La Ondo de Esperanto* prenis parte ĝian rolon.

Tamen la dua duono de la 1990-aj jaroj jam denove normaligis la situacion kun 17 originalaj romanoj. Krome, kvankam estas ankoraŭ frue diri ion definitivan, la unuaj jaroj de la komencinta unua jardeko (2000-2009) aŭguras brilan romanan jardekon: dum la unuaj tri jaroj aperis jam deko da originalaj romanoj.

En la poezio la kvara periodo ne same elstaras ol en prozo. Ekzemple, el la libroj de la baza legolisto de William Auld nur *Esperanta Antologio* aperis post 1975 kaj en la antologio la plej granda parto el tekstoj originas el pli fruaj periodoj. Tamen en ĝisdatigo de la legolisto en 1997 Auld proponas sep novajn poemarojn el kiuj ses aperis dum la kvara periodo. Tamen eĉ kun tia aldono nur kvarono el la poemaroj en la baza legolisto aperis dum tiu periodo, kompare al 37% el la prozaj verkoj (la origina listo kaj la ĝisdatigo kunigitaj).

Ecoj de la kvara periodo

En la kvara periodo la kvanto de la originala literaturo grave kreskis. Ne temas nur pri la kresko en la nombro de aperintaj verkoj, sed ankaŭ pri la kresko de paĝokvanto. Kvankam la statistikaj informoj mankas, eblas klare diri, ke jam la kreskanta rolo de la romanoj (laŭ difino minimume proksimume 100 paĝaj) signifis kreskon de paĝonombro.

Inter la plej produktivaj romanistoj de la periodo apartenas István Nemere (14 romanoj), Johán Valano (Claude Piron, sep romanoj) kaj Lorjak (Jacques-Louis Mahé, sep romanoj). Krome pluraj aŭtoroj verkis du aŭ tri romanojn kaj la entuta kvanto da romanverkistoj proksimas al 40. Fakte, dum la periodo aperis ankaŭ romanoj, kiuj estas verkitaj pli frue sed kiuj povis aperi nur dum tiu ĉi periodo (en tio estas nenio nova, same okazis jam pli frue, ekzemple ĉe *Vojaĝo al Kazoĥinio* de Szathmári). Tamen la tempopaso de la verkado ĝis la eldonado fariĝis malpli longa, i.a. *La litomišla tombejo* estis verkita komence de la 1970-aj jaroj kaj eldoniĝis jam en 1981 (Buller 1990, 677).

La romanoj de la kvara epoko reprezentas vastan gamon da stiloj kaj subgrupoj. Aparte notinda estas la granda kvanto da leĝeraj romanoj kaj krimromanoj. Ĝuste la krimromanoj fariĝis unu el la plej popularaj ĝenroj de originala esperanta romano dum la kvara periodo. El la romanoj aperintaj inter 1975-1999 pli ol 20 estas krim- aŭ aventurromanoj. Antaŭ 1975 tiaj romanoj estis relative maloftaj.

Aperis ankaŭ romanoj kies intrigo okazas en esperanta medio. Kvankam ili estas relative maloftaj kaj similaj aperis ankaŭ pli frue, ili allogis legantojn ĝuste pro esperanteco de la intrigo. Al ili apartenas ekzemple *Oni ne pafas en Jamburg* de Mikaelo Bronŝtejn, *Murdo en Esperantujo* de Daniel Moirand, *Kiuj semas plorante* de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal, *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimec kaj la skandaleca *La Manto* de la pseŭdonima aŭtoro Paula Mährti.

Foje romanoj okazas ankaŭ en medio de internacia politiko kaj neesperanta socio. Ankaŭ tiuj ĉi romanoj elĉerpis ion el esperanta socio. Nome, ne malofte en ili aŭdeblas aparte humanisma tono, kiel ekzemple en romanoj de Trevor Steele kaj John Francis kaj en kelkaj romanoj de István Nemere. Krome kelkaj aliaj romanoj de Nemere estas klare aventuraj romanoj por plezuro kaj tempopasado de leganto. Al tiu ĉi lasta grupo apartenas ankaŭ romanoj de Manjo Austin.

Kvankam la romanoj estas la plej okulfrapa eco de la kvara periodo ne eblas malatenti ankaŭ la aliajn branĉojn de la literaturo. Apud la poezio gravas la ekesto kaj evoluo de esperanta muzika kulturo kaj aparte la esperanta rokmuziko. Esperantlingvaj kantoj kaj muziko, kiuj restis preskaŭ sen mencio en *Esperanto en perspektivo* aperinta en 1974, fariĝis esenca parto de la nuntempa esperanta kulturo. La unuaj rokgrupoj aperis en la 1980-aj jaroj kaj la faka asocio de rokmuzikistoj estis fondita en 1988. Jam pli frue ekzistis esperantaj kanzonistoj, kies unuaj kasedoj aperis fine de la 1970-aj jaroj. Populariĝo de kasedoj (anstataŭ gramofondiskoj) igis eldonadon de esperantlingva muziko pli facila kaj lastatempe populariĝis ankaŭ kompaktaj diskoj (ekde 1988), eldonformo kiun nur antaŭ iom pli ol unu jardeko gvidantaj esperantaj rokmuzikistoj opiniis ekonomie neebla.

Esperanta poezio en la kvara periodo komencis draste evolui, unuavice pro tio ke ĝi ne plu sekvas la regulojn de *Parnasa gvidlibro*. Iasence la paradigmo de *Parnasa gvidlibro* atingis sian finon kaj en la nova epoko de la poezio ne plu estas bezonata tiaj gvidlibroj. La plej gravaj poeziaj skoloj de la epoko tamen formiĝis nur en la 1990-aj jaroj kiam formiĝis ibera skolo kaj moskva skolo. Se la ibera skolo havas ankaŭ komunajn lingvajn kaj stilajn ecojn, la Moskva skolo difineblas nur geografie kaj surbaze de unu poemkolekto.

Ankaŭ lingvoteorie la kvara periodo signifis konflikton kun la regantaj ideoj de la pli fruaj periodoj. En 1975 eksplodis bros-problemo kiam István Szerdahelyi kritikis “la oficialan teorion pri vortfarado, ellaboritan de Kalocsay kaj Waringhien, kaj sankciitan de la Akademio de Esperanto” (Martinelli k.a. 1994). Iaspeca daŭrigo de kritiko estas prezentita de Claude Piron en sia pamfleto *La Bona Lingvo*. Tamen ne temis pri ŝanĝiĝo de paradigmoj sed apero de senparadigma fazo: apud la elinterna (skemisma) skolo de Piron gravan rolon havas naturalisma (elekstera) skolo kaj krome eblus distingi almenaŭ la analizan skolon de Rikardo Ŝulco.

Apud la kvanta kresko eble la plej grava eco estas fragmentiĝo de la esperanta literaturo. Apenaŭ plu ekzistas malgranda kvanto da gvidaj literaturaj revuoj: *Literatura Foiro* fariĝis organo de unu, relative malgranda movada kaj literatura tendenco, *Fonto*, *Hungara Vivo* kaj lastatempe *La Ondo de Esperanto* ne sukcesis gajni grandan kvanton da legantoj kaj la literatura rolo de *Esperanto* malgraviĝis (i.a. ne plu aperas speciala ĉiujara literatura numero). Fragmentiĝo estas videbla ankaŭ en la rolo de vortaroj kaj gramatikoj. *Plena Ilustrita Vortaro* estas kritikata pro ĝia naturalismo, *Plena Analiza Gramatiko* ricevis apud ĝi aliajn gramatikojn kiuj baziĝas sur aliaj lingvaj ideoj, i.a. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*.

Konklude

Se difini la esperantan literaturon en kvar periodojn, la unuan (1887-1920) klare distingas la rolo de tradukoj. La duan periodon (1920-1945) distingas la evoluo de poezio sed ankaŭ evoluo, kvankam malpli grava, de romanoj kaj dramo. La tria periodo (1945-1974) reprezentas malpli imponan periodon dum kiu tamen evoluis la esperanta novelo kaj daŭrigis la evoluo surbaze de ideoj prezentitaj dum la dua periodo.

Fine, la kvara periodo (ekde 1975) estas periodo de originalaj romanoj kaj eksperimenta poezio. Malsame kiel en tri antaŭaj periodoj mankas malgranda nombro da centraj verkistoj kaj literaturaj revuoj kiuj influas al la aliaj. La esperanta literaturo fragmentiĝis, kreskis kvante tiom, ke troviĝas spaco por diversaj skoloj kaj lingvaj stiloj.

La kvaran periodon aŭguris la apero de *Plena Ilustrita Vortaro* en 1970 kies dua eldono aperis en 2002. Ĉu jam antaŭvideblas la komenco de la kvina periodo?

Literaturo:

Auld, William: *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto*. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979.

Buller, Osmo: Hamburgo en beletra vivo. En verko *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo, IV Arqueología y arte. Miscelánea.* La Laguna 1990, 677-682.

Carlevaro, Tazio: Originala Beletro. En verko *Esperanto en Perspektivo*. Rotterdam: UEA, 1974.

Enciklopedio de Esperanto. Red. L. Kökény kaj V. Bleier. Budapest: Literatura Mondo, 1933.

Johansson, Sten: Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999. *Esperanto* 1131 (12/2000), 202-205.

Kralj, Drago: *Kvar prelegoj pri esperanta literaturo*. Ljubljana: Eldona Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo, 1960.

Martinelli, Perla Ari kaj aliaj: *La 25 jaroj de Literatura Foiro*. Dulingva ekspozicio en Budapeŝto, 10-16 septembro 1994. Esperanta PEN-centro kaj Pro Helvetia.

Piron, Claude: *La Bona Lingvo*. Vieno: Pro Esperanto & Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989.